

Kiam Miyamoto recenzas

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-832/307, 1979 septembro 20 kaj 22
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-46/SRI-1979-46-B-4-307-832-1979-09-20-22-Claude-kaj-Andree-Gacond-Kiam-Miyamoto-recenzas.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon ni konkludis nian prezenton de la nova libro de Miyamoto masao "Sarkasme kaj entuziasme eseis Miyamoto masao", anoncanta nian intencon pli longe citadi el la recenzoj de la japana verkisto. Tiuj ĉi recenzoj, kiuj aperis ekde 1954 ĝis hodiaŭ en granda nombro da revuoj, konsistigas la ĉefparton de la libro kaj donas al ĝi aparte kritikan karakteron. Jen unue eroj el recenzo de Miyamoto masao pri la verko Koloroj de Julio Baghy. Ĝi aperis en 1965 en la organo Kajero, Numero 5. Ni citas:

A.- "Rilate la nivelon de nia originala literaturo mi ankoraŭ restas skeptika, dum niaj kolegoj penas ĉiel konvinki nin. Ilia bona intenco estas sufiĉe komprenebla, sed tamen mi pensas, ke bedaŭrinde nia nivelo ankoraŭ postrestas kompare kun tiu de naciaj literaturoj kaj ĉiam perfidas tiajn propagandcelajn asertojn. Tio kompreneble ne signifas, ke mi rekomendas rezigni pri la originala, sed tute kontraŭe, mi volas stimuli kaj akceli la verkadon pli energian sur la bazo de scikono pri la realaĵoj...

Cl.- Miyamoto masao daŭrigis sian kritikon de la verko de Baghy per tiuj ĉi paroloj: "Post plurfoja tralego restas ĉe mi nur impresoj pri lia bonega stilo freŝe verva, kiu foje pelas min en malesperon pri mia malkapablo. Sed tamen nur tiel! La Literaturo ne konsistas nur el stilo aŭ el sintakso kaj esprimoj; ĝi devas havi ankoraŭ plurajn elementojn... Liaj temoj estas tro malfreŝaj escepte ĉe "La Krozado al Afriko" kaj "La spirito ne gravas", kiuj epizodas pri esperantista vivo... Ĝenerale la strukturo kaj intrigo estas tro naivaj aŭ malriĉaj... la karakteroj ne sufiĉe vivas en la verko, kaj foje ŝajnas simple marionetoj por la ideo de la aŭtoro... Sed kiel esprimriĉa estas lia lingvo!

A.- Miyamoto masao mencias originalajn vortkunmetaĵojn kiel "tombserĉe kaduka maljunulo", "mizerfrapita, vivplugita vizaĝo", "platventra, saketo", "Fantomavida rigardo", "Prujnotuŝita hararo", kiuj refutas la aserton de Ilia Erenburg: "verkoj de novico estas tiel sekaj, kiel tiuj en Esperanto..." kaj reliefas la fekundan influon de Julio Baghy.

Cl.- Postnote al recenzo aperinta en la revuo Esperanto en 1968, Numero 749, pri la verko Memkritiko de Victor Sadler, Miyamoto masao sarkasme skribas: "La artikolo estis mallongigita ĝuste tie, kie la recenzanto indikis, laŭ sia vidpunkto, malfortaĵojn far de la redaktoro, kiu estis la aŭtoro de tiu ĉi recenzita verko."

A.- Tiuj reĝustigoj estas utilaj kaj bedaŭrinde ne grandigas la tiaman redaktoron de Esperanto.

Cl.- En eseo pri "La ebleco de internacia literaturo en esperanto kaj ĝia nuna stato en Japanio" Miyamoto masao interese reliefas la malfacilon de internacia ĝenerala komprenado. Ni citu lin ekzemple:

A.- "...La aŭtoro nun devas prezenti... malfacilon por la internacia literaturo en Esperanto, kiu neniel venas de la malforteco de la lingvo, nek de iu ajn lingvo. Ĝi ne kuŝas en tia fakto, sed en la malfacilo de internacia ĝenerala komprenado, kiu estas akcesoraĵo de ĉiu lingvo.

Cl.- "Hototogisu" apartenas al la kukoledoj laŭ zoologia klasifiko, kaj oni esprimas tiun birdon en Esperanto "kukolo", krom escepta okazo, en kiu oni nepre bezonas determini ĝin terminologie. En Japanio (kaj ankaŭ en Ĉinio) ĝi estas konsiderata kun certa afekcio, ekzemple kun asociacio "sputi sangon", aŭ "plorkrii", sed en Francio ĉe tiu vorto oni tuj imagas tute alian, se ne tragikan, komikan scenon, ĉar en tiu lando la birdo simbolas la "kokrito"-n. Do kian scenon povas imagi ordinarnaj francoj ĉe la utao de Gotokudaizi?

Kukol' ekkriis,
mi turnis la okulojn
en la direkto,
nur la matena luno
surpendas en neglekto.

A.- Sendube simplaj francoj ne povas deteni sin de rideksplodo ĉe tiu utao. – konkludas, laŭ ni malprave Miyamoto masao, ĉar la kukolo ankaŭ kaj eble antaŭ ĉio simbolas printempan etoson, feliĉan anoncanton.

Cl.- Miyamoto masao donas multajn aliajn interesajn ekzemplojn. Kaj li konkludas:

A.- "...Ĉiu lingvo havas sian limon por komuniki sian enhavon aŭ nuancon laŭklase, laŭnacie, laŭgente aŭ eĉ laŭpersone, kaj tian malavantaĝon neniŭ povas imputi al lingvo mem. Ankaŭ Esperanto, la internacia lingvo, aŭ laŭ mia opinio, interpopola lingvo, prave enhavas ian limon same kiel "naturaj" aŭ "naciaj" lingvoj.

Cl.- "Nome, la nekomprenebleco aŭ senkomunikeco ŝuldiĝas ne al la lingva malavantaĝo sed al la diverseco de la moroj, sentoj kaj aliaj, nome la nacia atributo.

A.- "La kondiĉoj de la esperanta literaturo restas tute samaj, kaj ĝi evoluas kaj evoluos, same kiel nacilingvaj literaturoj laŭ la progreso de la internacia aŭ tuthomara kulturo."

Cl.- Fine por doni al vi ideon pri la sarkasma tono de Miyamoto masao, ni citu erojn el recenzo pri recenzo. Miyamoto ĝin titolis "Jen ekzemplo de senutila recenzo":

A.- ..."Tuj post la. apero de mia artikolo ... mi ricevis demandon ... ĉu mi povos prezenti ekzemplon de... senutila aŭ kanajla recenzo.

Cl.- "Nu, malbonegan ekzemplon vi vidu, ekzemple, en "Esperanto" de UEA, n-ro 713, faritan de I. L. pri nia eldonaĵo "Konstitucio de Regno Japanio".

A.- "Nature ĉi tiu subskribo tiras nian atenton al Prof. D-ro Ivo Lapenna, sed neniel povas verki, kompreneble, nia altestimata prezidanto tiel stulte, kaj cetere li ne estas specialisto pri konstitucio, mi volas kredi kaj garantii. Ĉi tiu persono, I. L. tute ne havas penskapablon kaj faris tro supraĵe sian priskribon rilate la eldonaĵon.

Cl.- "Bedaŭrinde la traduko ne estas bona," li diris kaj citis multajn gramatikajn erarojn por pruvi. Jes, mi samopinias kun li. Sed tamen mi dubas, ĉu tia povas meriti la nomon de

recenzo, kiu estas laŭ Plena Vortaro, "fari en gazeto mallongan kritikan raporton pri iu verko, spektaklo aŭ ludo, montrante la kvalitojn kaj mankojn." jes, li prave montris la mankojn sed nur gramatikajn, kaj tute forgesis pri la kvalito de la verko, se temas pri la enhavo. Se li estus specialisto ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de la juro, li nepre devus rimarki tre seriozan artikolon.

A.- Post prezento de tiu ĉi artikolo pri la rezigno de milito por solvi internacian konflikton, Miyamoto masao konkludas:

Cl.- Recenzisto nepre kritiku ne nur lingvajn mankojn, kiuj fine estas nur lingvaĵo, sed nepre la enhavon, nome la kvaliton. Ŝajnas ke inter mi kaj li (tio estas I. L.) troviĝas grandega abismo en koncepto pri nia lingvo. Mi tamen apelas al konsciencaj esperantistoj, ke ni ignoru tiajn fiaĵojn, kaj moku tian ulon, kiel I. L., kiu kompreneble neniel povus esti nia prezidanto, mi esperas.

A.- Povu tiuj kelkaj citaĵoj el recenzoj de Miyamoto masao instigi vin legi lian verkon Sarkasme kaj entuziasme eseis Miyamoto masao.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Prelegis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*